# ĈEA-Retkomunikoj 2018/02

Estimata leganto,
permesu al ni saluti vin la duan fojon en jaro 2018 dum la varma somera tago.
En la numero ni ŝatus informi vin pri okazaĵoj en la Esperanto-muzeo kaj ankaŭ pri la aranĝo en Čáslav kaj Vrdy omaĝe al F. V. Lorenz. Do agrablan legadon!

## OKAZAĴOJ EN LA ESPERANTO-MUZEO

### ALIĜILO POR LA MUZEA SOLENAĴO 14.-16.9.2018 DISPONEBLAS!

Ne prokrastu la limdaton por aliĝoj 31.8.!

Okaze de la 10jariĝo de la Esperanto-Muzeo preparatas por vi inaŭguro de la nova ekspozicio, solena programo, busekskurso al Moravská Třebová, ĉeĥoslovaka vespero, Internacia muzea seminario kaj urbopromeno. Precipe vi, kiuj ankoraŭ ne vizitis la muzeon, ne evitu la okazon tion fari ĝuste nun!
En Kalendaro de aranĝoj elŝuteblas DETALAJ INFORMOJ KAJ LA ALIĜILO
Atentu: La limdato validas ankaŭ por **unutagaj partoprenantoj**, kiuj deziras ekskursi al Moravská Třebová!
Kontakto: cea@esperanto.cz

### ALVOKO RILATE AL PRETIGO DE LA NOVA EKSPOZICIO

Krom "10 jaroj de la muzeo" Por la akompana ĉeftemo  "Cent jaroj de la respubliko" - resp. "Esperanto en Ĉeĥoslovakio en 1918-1968" ni serĉas interesajn ekspoziciajn materialojn (krom libroj kaj gazetoj) - fotaĵojn (kun priskriboj), kolektmaterialojn, arkivaĵojn/manuskriptojn, filmojn k.a. el la koncerna periodo!
Taŭgaj materialoj uzeblos en la fizika ekspozicio, en la infpanelo aŭ en fotoalbumoj en la interreto.
Dank al via kunlaboro la ekspozicio povos iĝos pli ampleksa, pli varia kaj pli interesa!
Bv. skribi kaj fari proponon al pavla.dvorakova@esperanto.cz

## Rektaj videoelsendoj el la kluba solenaĵo en Svitavy

Okaze de la 85-a datreveno de Esperanta klubo en Svitavy Verda Stacio Ostrava preparas por la 4-a kaj la 5-a de aŭgusto vivajn elsendojn rekte el la Esperanto-Muzeo. Ni invitas vin al ilia spektado!

## PRI LA ARANĜO EN ČÁSLAV KAJ VRDY OMAĜE AL F. V. LORENZ

Jen kompeta multmedia dokumentado pri la aranĝo okazinta la 8-an de julio.

**Ĉeĥlingve:**

Ceremoniál k uctění památky praotce českých esperantistů F. V. Lorence 13.7. (entenas ankaŭ komunan fotaĵojn kaj ligilojn al la artikoloj en la amaskomunukiloj, videojn el la programo kaj sudbrazilan muzikon)

26. červenec je Dnem spravedlivé komunikace - entenas ankaŭ aktualan informon pri la aranĝo rilate al la Esperanto-Muzeo kaj partoprenantoj el Svitavy kaj invitilon al la muzeo (okaze de la Esperanto-Tago)

**Esperante:**
Omaĝo al la prapatro de ĉeĥaj esperantistoj, genio kaj poligloto F. V. Lorenz - 26.7. (alkroĉe entenas i.a. kompletan ekspozician panelon pri Lorenz, artikolojn de P. Chrdle aperintajn pri la aranĝo en Brazilo kaj specimenojn el la romano "Hetajro dancas", en kiuj Eli Urbanová rememoras pri sia naskiĝurbo Čáslav)

Pocta géniu F. V. Lorencovi / Omaĝo al la genio F. V. Lorenz - (96 fotaĵoj ne nur el la ceremonio, sed ankaŭ el kleriga-turisma programo en Čáslav kaj el vizito de Zbyslav)

## Oficiala Vizaĝlibra paĝaro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kreskas!

Jam pli ol unu jaron funkcias oficiala Vizaĝlibra paĝaro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Celo de la paĝaro estas informi vin pri novaĵoj de la esperanta movado en Ĉeĥio kaj en la mondo. La redakcia teamo klopodas preskaŭ ĉiun tagon oferti ion interesan! Sekvu nin ĉe Facebook! Ne forgesu ankaŭ vizitadi la paĝon de Esperanto-Muzeo. Dank al viaj ŝatklakoj kaj komentarioj informojn vidos pli da homoj.

## Eventoj

La ĈEA-Konferenco en Benešov (12.-14.10.2018) proksimiĝas! Do, ne forgesu, ke la unua plej avantaĝa limdato por aliĝo estas 15.9.! Detalaj informoj kaj aliĝilo!

### 10-12/08: 21-a renkonto de ekstendaranoj (de SET)

Solena renkontiĝo de eksaj tendaranoj kaj amikoj en Lančov.

### 14-16/09: 10 jaroj de Esperanto-Muzeo en Svitavy

ĈEA elkore invitas vin soleni kune la rondan naskiĝtagon de la muzeo!

### 19-22/09: La 48-a Lingva Seminario

Semajnfina seminario en familieca pensiono ESPERO, kiu troviĝas en pitoreska okcidenta part sabloŝtona Bohemia Paradizo (norde de Prago), plena de divesspecaj turismaj allogaĵoj (kultur kaj naturaj).

*Se vi volas scii pli pri aliaj eventoj, vizitu nian paĝon aŭ ankaŭ retejon Eventoj.hu - internacian kalendaron de Esperanto-aranĝoj! Volonte sendu ankaŭ viajn proponojn pri aranĝoj!*